

# KOMUNIKOJ

TRIMONATA BULTENO DE SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ  
Jaro 41-a BRAZILO, APRILO-MAJO-JUNIO 2017 N-ro 166

“Amu vian Dion per via tuta koro kaj per via tuta animo kaj per via tuta menso kaj vian proksimulon kiel vin mem.”  
JESUO (Mt, 22:37-40).

“Neskuebla fido estas nur tiu, kiu povas rekte rigardi la racion en ĉiuj aĝoj de la homaro.”  
KARDEC. *La Evangelio laŭ Spiritismo.*  
Ĉap. 19, §7.

“Sur neŭtrala lingva fundamento, komprenante unu la alian, la popoloj faros en konsento unu grandan rondon familian.”  
ZAMENHOF. *La Espero.*

## Egaleco

**K**ial oni vidas tiom da diferencoj inter la homoj? Dio, kiel justa kreanto, ne povus krei malsamajn filojn. Sed oni vidas homojn, kiuj naskiĝis meze de riĉeco, komforto, ĉiam respektataj kaj amataj, dum aliaj naskiĝis en malriĉeco, sen amo, sen eblo akiri instruadon, ĉu pro manko da mono, ĉu pro manko da inteligenteco, dum aliaj heredas riĉaĵojn kaj krom tio rapide kapablas lerni sciencojn, literaturon, muzikon, filozofion... Ĉu Dio amas kelkajn pli ol aliajn? Kial tiom da diferencoj inter filoj de la sama Patro?


Ĉiuj religioj firme asertas, ke Dio estas justa, sed ne ĉiuj klarigas kial ekzistas tiom da diferencoj inter la homoj. La plej evidentaj malegalecoj ekzistas inter la rajtoj de viro kaj virino kaj inter la rasoj. Feliĉe, tiuj diferencoj – post longaj kaj akraj bataloj – malgrandiĝadis. Modernaj leĝoj, precipe en okcidentaj landoj, mildiĝadis, kvankam malrapide, la suferon de virinoj kaj de homoj ne blankaj, venigante iom da egaleco. La progresado de la Homaro iom post iom produktas leĝojn pli konformaj al la egaleco, al la justeco.

Sed, ekestas grava demando: Ĉu la homoj, pere de la kreado de siaj novaj leĝoj, ebligas al Dio fariĝi pli justa? Ĉu la homoj kapablas perfektigi la leĝojn de Dio? Ne, certe ne. Sed pluraj religioj ne kapablas ekspliki tiun demandon. Nur religioj, kiuj akceptas la evoluadon de la spiritoj pere de sinsekvaj reenkarnejoj, povas ĝuste klarigi la aferon. Laŭ ties klarigoj, animo ne havas sekson kaj ĝi povas enkarniĝi kiel viro aŭ virino. La animo ne havas koloron. Ĝi povas enkarniĝi en tiu aŭ alia raso, laŭlonge de sia evoluo. Verdire, la nuraj religioj montrantaj la perfektan justecon de Dio rilate al la egaleco inter ĉiuj estuloj, estas tiuj, kies principoj baziĝas sur la evoluo de la animo. Ĉiuj animoj estas kreitaj absolute egalaj, kaj evoluadas tra la pluraj regnoj de la vivo, en pluraj specioj, uzante karnajn korpojn dum jarmiloj post jarmiloj. Tra tiuj sinsekvaj jarmiloj, ĝi atingas la homan kondiĉon. Tiam ĝi enkarniĝas plurfoje, kiel viro aŭ virino, en tiu aŭ alia raso, laŭ la leĝo de respondeco kaj rajto. Do, haŭtkoloro kaj sekso apartenas nur al materia vivo. Absoluta egaleco estas leĝo de Dio, kiun iom post iom la homoj malkovras.

José Passini  
jose.passini@gmail.com

Ĉi-numero de Komunikoj omaĝas la brazilan veteranon Alberto Flores, 93 jara, konsilanto kaj kompetenta kunlaboranto de nia Eldonejo. Li vere estas bona ekzemplo por ĉiuj esperantistoj. Ĝis nun, li aktivas en la E-movado, prelegas kaj instruas Esperanton. Inda esperantisto kiu meritas niajn aplaŭdojn!

Gratulon, Flores, kara frato!



*“Mi ĉion faras hejme. Mi estas tute memdecida kaj sendependa kaj konstante laborigas mian cerbon. Esperantostudado estas esperantoterapio.”* (Alberto Flores)

Karaj gelegantoj,

**L**a mondo en kiu ni vivas estas plena je problemoj, defioj, obstakloj kaj provoj. Tamen, situacio tia ekzistas por movigi en ni la fortojn de la spirito, kapablajn kontraŭi ĉion negativan kaj ankaŭ burĝoni la grandajn homajn virtojn.

Tiusence, ni kundividus kun nia legantaro plian modestan kontribuon, celantan konstruadon de mondo plibona, per disvastigo de faroj kaj personoj dotitaj de talentoj ege specialaj.

Ni ankaŭ volas reliefigi la laboron de kelkaj fratamikoj, kiuj helpas al ni en tiu ĉi entrepreno, kiel la nelacigebla Evandro Caboco, el Rio-de-Ĵaneiro, arda defendendo de la afero esperanta, kaj nia korespondanto Iurij Kivaev, el Rusio, kiu pri nia bulteno skribis: “Komunikoj meritis tutan mian atenton, tuta alia afero majstre riĉa kaj bele ilustrita. Mi tra legis kaj aplaŭdegis ĝin. Gratulegon!”

Al tiuj du kaj aliaj amikoj de Eldonejo Lorenz, niajn plej sincerajn dankojn!

## Lastaj lanĉoj de Eldonejo Lorenz en la portugala lingvo



**SENPAGAJ LIBROJ...**  
 Ĉiuj kiuj loĝas ekster Brazilo rajtas ricevi niajn librojn, en Esperanto, tute senpage. Sufiĉas nur sendi vian kompletan nomon kaj poŝtadreso al [editora\\_lorenz@uol.com.br](mailto:editora_lorenz@uol.com.br)

### LORENZ

#### “KOMUNIKOJ”

TRIMONATA BULTENO DE LORENZ – SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ

Fondita la 15-an de decembro 1975

Jaro 41-a – n-ro 166 | Aprilo-Majo-Junio 2017

Interreta kaj papera senpagaj eldonoj  
 Ĉirkaŭ dudek mil legantoj en la tuta mondo

#### KONTAKTIĜU KUN NI KAJ ALIĜU:

Spiritisma Eldona Asocio F. V. Lorenz  
 Rua Francisco Vale, 57 Engenheiro Leal  
 21370-171 Rio de Janeiro-RJ – Brasil (Brazilo)  
 Telefonoj: + 55-21-2452-9039 - + 55-21-2450-4768  
 Skajpo: Lorenz Editora | Fejsbuko: Editora Lorenz | Retadreso: [editora\\_lorenz@uol.com.br](mailto:editora_lorenz@uol.com.br)  
 Retpaĝo: <http://editoralorenz.blogspot.com.br>



Kompostita de Rogério Mota

# 52<sup>a</sup> Brazila Kongreso de Esperanto

La 52a BKE (Brazila Kongreso de Esperanto) efektiviĝis en urbo 'Sorriso', ŝtato Matogroso, centrokcidente de Brazilo, de la 15a ĝis la 18a de junio 2017, ĉe loka Centro de Eventoj. Ĉeestis pli ol 120 personoj el diversaj brazilaj urboj.

La tridekunujara urbo Sorriso estas bela kaj progresema. En ĝi loĝas pli ol 80 mil homoj. Sorriso estas konata kiel la 'brazila ĉefurbo de la agronegoco'.

En la solena malfermo, Evandro Ferreira de Avellar, prezidanto de Brazila Esperanto-Ligo, prelegis pri la ĉeftemo de tiu grava kongreso: "Esperanto - lingvo kun historio kaj kulturo."

Post la parolo de la prezidanto, Tarcísio Lima, el Fortalezo, kantis belajn esperantajn kanzonojn, kaj la loka kantisto Paulinho Mato Grosso regalis la ĉeestantaron per regionaj kantoj.

Inter la pluraj eroj de la 52a BKE, elstaris prelego de João Silva dos Santos, direktoro de Eldonejo Lorenz, kiu pritraktis la temon "Memmortigo", la 16an de junio.

La organizantoj de la kongreso starigis "movadan foiron", en kiu partoprenis Societo Lorenz, sub la kunordigo de Robinson Mattos, ĝia prezidanto.

La subaj fotoj estis faritaj de Joaquim Mariano, el Gojanjo, Gojaso, al kiu ni kore dankas.



La kantisto Tarcísio Lima kaj Robinson Mattos (prezidanto de Lorenz)



La ĉeestantaro



Parto de la aŭditorio



La aŭtoritatuloj ĉe La tablo, en la solena malfermo



Tarcísio Lima kantas

# Kuriozaĵoj el la leteroj de Zamenhof



Al Majnov, 1889

Tre estimata sinjoro!

Mi dankas vin kore por la alsendo de la respondo de Max Müller kaj nun mi resendas al vi laŭ via peto lian letereton returne. Kun plezuro mi sciigis ke la granda Princo permesis al vi traduki liajn verkojn. Kiam via traduko estos preta, mi petos vin sendi al mi la manuskripton por iom glatigi la stilon, kaj tiam ni devos peti la princon ke li permesu al ni surskribi en la komencon: “tradukita kaj eldonita kun la permeso de Lia reĝida Moŝto”.

Eldonadi la ĵurnalon en la eksterlando mi ne povas, ĉar ĝi kostus multe da mono, kaj abonantojn mi havus tro malmulte (ĉar la sendado de la gazeto en fermitaj kovertoj estus tro multekosta por la plej granda parto de niaj amikoj en Rusujo). Sed mi esperas ke de Julio de tiu ĉi jaro mi povos komenci la eldonadon de “Biblioteko Internacia”, kiu enhavos ĉion tion saman kion devus enhavi gazeto, nur sub alia nomo. (En Julio mi esperas jam havi cenzuriston por niaj verkoj.) Tiam mi ankaŭ komencos eldonadi (per apartaj kajeroj) la nomaron de niaj amikoj.

En la diversaj grandaj urboj de la mondo mi ne havas tenejon de niaj verkoj, kaj kiu deziras ricevi ian verkon, devas sin turni rekte al mi; ĉar mi dissendis po 1 ekzemplero al ĉiuj libristoj de la diversaj urboj, sed sendi senmone pli ol po 1 ekzempl. mi ne povis ĉar tio ĉi kostus tre multe da mono, kion mi ne havas.

Kelkajn adresojn de esperantistoj donos al vi sinjoro E. de Wahl; ĉiujn aliajn adresojn mi ne povas ankoraŭ doni al vi private, ĉar mi ne scias ĉu tiuj personoj volas korespondi; sed en Julio estos eldonita prese kaj publike la unua serio (1000) nomoj de la senkondiĉuloj.

(Fonto: *OM Reviziita Plena Verkaro de L. L. Zamenhof: originalaro 1: unua etapo de Esperanto: 1878-1895.* Tokio: Eldonejo Ludovikito, 1989. p. 230-232.)

## LORENZ EN LA 52a BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO

La 16-an de Junio, pli ol 30 geesperantistoj ĉeestis la prelegon de dr-o João Silva dos Santos, direktoro de Lorenz, okaze de la 52-a Brazila Kongreso de Esperanto en la bela urbo Sorriso. D-ro João klare paroladis pri la temo, inkluzive montrante diversajn statistikojn el pluraj landoj, kiel la suba tabelo, koncernanta la 10 landojn kun la plej granda nombro de memmortigo:

Nr. O	Lando	Kontinento	p/100.000
1°	Litovio	Eŭropo	31
2°	Sud-Koreio	Azio	28.1
3°	Gujano	Sudameriko	26.4
4°	Kazaĥio	Azio	25.6
5°	Slovenio	Eŭropo	21.8
6°	Hungario	Eŭropo	21.7
7°	Japanio	Azio	21.4
8°	Srilanko	Azio	21.3
9°	Latvio	Eŭropo	20.8
10°	Belorusio	Eŭropo	20.5

Se la karaj gelegantoj de nia ‘Komunikoj’ volos scii aliajn detalojn pri la temo, skribu rekte al d-ro João:

[sisant.esperanto@yahoo.com.br](mailto:sisant.esperanto@yahoo.com.br)



**KUNLABORU!** – Membriĝu ĉe ASOCIO LORENZ kaj helpu la disvastigon de Esperanto kaj Spiritismo en la tuta mondo!

**COLABORE!** – Torne-se membro da ASSOCIAÇÃO LORENZ e auxilie a divulgação do Esperanto e do Espiritismo em todo o mundo!

# CÍCERO PEREIRA, AMIKO DE CHICO XAVIER

Eurípedes A. Barbosa



**C**ícero dos Santos da Silva Pereira estis humila, simpla, sobra kaj aŭstera homo, sed tre inteligenta, klera, poligloto kaj esperantisto. Li studis jursciencan kaj farifĝis advokato.

Cícero Pereira naskiĝis en la vilaĝo 'São José do Gorotuba', apartenanta al municipo de 'Grão Mogol', ŝtato 'Minas Gerais', la 11an de novembro 1881. Li estis la dua filo de la paro Manoel José da Silva Pereira kaj Ludovica.

Jam de sia infanaĝo, Cícero interesiĝis pri spiritualismaj aferoj. Kiam li estis 13-jara, li fariĝis spiritisto, sub la influo de la granda spiritisma oratoro Antônio Loureiro. Ambaŭ amikiĝis en la urbo 'Montes Claros'.

Tiu laborema kaj evoluinta spirito agadis laŭ la evangeliuj instruoj de Jesuo, kaj fratece sin dediĉis al Spiritisma Doktrino.

Li studis ĉe elementa lernejo en 'São João do Garatuba', kaj poste transloĝiĝis al 'Montes Claros', kie li faris porinstruistan kurson. Post tiu kurso, Cícero fariĝis instruisto en tiu lernejo kaj sekve ties lernejestro.

En la 5a de marto 1903, Cícero edziĝis al instruistino Guiomar Léllis, kiu antaŭe estis lia lernantino. Ili ne havis gefilojn, sed adoptis la knabon Ruy Sócrates Loureiro kaj tri nevojn. Cícero kaj lia edzino zorgis pri ili kvazaŭ ili estus veraj filoj.

Reveninte al la urbo Grão Mogol, en 1909, li profesiis kiel instruisto. Tie li estis ankaŭ urbestro, impostisto kaj verkis por la loka gazeto. Li varbis al Spiritismo multe da adeptoj danke al sia simpatio, klereco kaj pro la fakto, ke li estis talenta oratoro. Pro siaj fortaj spiritismaj konvinkoj, Cícero suferis religian persekutadon dum preskaŭ 10 jaroj. Kiel bona kristano, li toleris la agresojn kun sereneco kaj toleremo, helpate de amikaj, elkarniĝintaj spiritoj.

En 1920, li denove transloĝiĝis al Montes Claros, kie li fariĝis estro de agentejo de Banco da Lavoura. Kune kun aliaj instruistoj li reorganizis la Porinstruistan Lernejon. Oni elektis lin direktoro de tiu lernejo. Tiam li fariĝis membro de la Beletra Akademio de Montes Claros. Post lia morto, la urbestro de tiu urbo donis, per dekreto, lian nomon al strato de la kvartalo Santos Reis.

Cícero transloĝiĝis al Belo Horizonte en 1927, kie li laboris en Banco da Lavoura kaj sin dediĉis al publika instruado. Li fondis la gazeton 'O Tempo' (La Tempo) kaj fariĝis membro de la organizaĵo União Espírita Mineira (Minasa Spiritisma Unuiĝo) kaj ties kasisto.

Cícero, fervora esperantisto, senlace propagandis la lingvon de Zamenhof. Danke al iniciato de tiu eminentulo estis kreita ĉe Minasa Spiritisma Unuiĝo la 'Grupo Esperantista Humberto de Campos', en 1940, laŭ informo aperinta en la Analoj de la 15-a Brazila Kongreso de Esperanto. Cícero prelegis pri la temo Avantaĝo de Esperanto dum la unua esperantista semajno de Belo Horizonte, okazinta de la 22-a ĝis la 26-a de aprilo 1941. Li prelegis ankaŭ en la solena malfermo kaj en la solena fermo de la unua minasa Esperanto-konvencio, kiu okazis en Belo Horizonte de la 25-a ĝis la 29-a de novembro 1947.

Cícero Pereira revivigis la gazeton 'O Espírita Mineiro' kaj estis ĝia redaktoro-sekretario. Malavare, li donacis monon por la aĉeto de la sidejo de Minasa Spiritisma Unuiĝo - UEM.

Cícero estis prezidanto de UEM de 1936 ĝis 1940. Poste li fariĝis vicprezidanto de tiu spiritisma institucio. Li ankaŭ estis ligita al kelkaj spiritismaj organizaĵoj de Belo Horizonte.

Amiko de Chico Xavier, Cícero multe helpis tiun mediumon komence de lia mediuma misio. Cícero agis kvazaŭ li estus patro de Chico. Tiu fama mediumo plurfoje vizitis la hejmon de Cícero.

En la verko 'Trinta anos com Chico Xavier' (Tridek jaroj kun Chico Xavier), Clóvis Tavares atestas, ke Cícero estis bela animo, humila kaj tre bonkora, kiu multe servis al suferantoj. La aŭtoro informas ankaŭ pri interesa afero rilate al tiu granda homo. Post sia elkarniĝo, Cícero spirite aperis al Chico Xavier, kaj la mediumo emociis ekriis: Kiom da lumo, instruisto! Cícero respondis: Estas la lumo de viaj okuloj, Chico...

La instruisto Cícero Pereira forpasis la 4an de novembro 1948, en Belo Horizonte, aĝante preskaŭ 67 jarojn.

La revuo Brazila Esperantisto, n-ro de januaro/marto 1949, paĝo 14, aperigis nekrologon pri Cícero Pereira, kiu teksas jene: "Kun bedaŭro ni sciigis pri la morto en Belo Horizonte de du samideanoj: instruisto Cícero Pereira kaj inĝeniero José Dias Vieira. Ambaŭ estis lertaj, sindonaj esperantistoj, kiuj, ĉiam pretaj kunlabori por la disvastigado de Esperanto, partoprenis ĉiujn lokajn movadojn, kunvenojn kaj esperantajn festojn."



Cícero dos Santos da Silva Pereira

# BAZA KURSO DE ESPERANTO 2017

**E**speranto ankaŭ estas amikeco, ĝojo kaj lernado, ĉar ĉiu esperantisto estas amiko, ĝojo kaj sperto. Pro tio, de 2004, mi instruas Esperanton al homoj de la tria aĝo en la Centro de Studo por la Tria Aĝo (NETI), ĉe Federacia Universitato de Sankta Katarino (UFSC), en la urbo 'Florianópolis', suda regiono de Brazilo. La Baza Kurso daŭras du semestrojn. Ĉi-jare matrikuliĝis dek kvar gelernantoj (kvar viroj kaj dek virinoj).

Estas plezure instrui Esperanton al maljunuloj, ĉar ili denove estas lernantoj, portas sin kiel junuloj, serĉantaj koni ion novan por vivi kaj efektiviĝi.

Kiuj estas ili? Nur homoj, kiuj laboradis. Nun ili scias, ke la vivo ankoraŭ daŭras, kaj ke aliaj homoj, kiel ili, malgraŭ sia aĝo, kunlaboras en la klopodo sekvi novajn vojojn. Multaj el ili diris, ke aŭdis pri Esperanto, kiam ili ankoraŭ estis junaj. Nun ili lernas ĝin kun la celo rilatiĝi kun la eksterlando.


Antonio Felix da Silva  
Vicdelegito kaj fakdelegito de UEA

Instruado, verkado, emerita militisto en la urbo Florianópolis, Sankta Katarino kaj vic-prezidanto de Esperanto-Asocio de 'Florianópolis'.



La instruisto Antonio Felix da Silva kaj liaj gelernantoj

## LANĈO: VERKO PRI LORENZ



Vlastimil Novobilský: *'Francisko Valdomiro Lorenz: atesto pri la vivo kaj verko de eksterordinara homo'*

El la ĉeĥa tradukis: Margit Turková. 159 paĝoj, formato 14 x 20 cm, broŝurita.

Eldonis: Eldonejo de Petro Chrdle KAVA-PECH

**F**. V. Lorenz (1872-1957) estas aŭtoro de la unua lernolibro de Esperanto en la ĉeĥa, kiun li eldonis jam en la jaro 1890, sed ankaŭ konata lingvisto, poligloto, pedagogo, naturkuracisto kaj, por spiritistoj, grava medio.

Li naskiĝis en Ĉeĥio kaj de infaneco li mirigis la ĉirkaŭaĵon pro sia talento pri lingvoj. Krom la studado de fremdaj lingvoj, inkluzive de Volapuko kaj Esperanto, li dediĉis sin al politika, socialdemokrata agado, i.a. kiel redaktoro de partiaj gazetoj. Pro tio minacis al li malliberiĝo kaj trijara soldatservo en la aŭstria-hungaria armeo. Por eviti tion li elmigris en Brazilon, kie li poste vivis ĝis la fino de sia vivo.

La libro priskribas lian malfacilan, sed tre interesan vivon, komence kiel ormineja ministro, poste, agrikulturisto, instruisto, naturkuracisto, sed, dume, diligenta verkisto en kaj tradukinto el multaj lingvoj. Inter liaj verkoj troviĝas ankaŭ lernolibroj de diversaj lingvoj, vortaroj, tradukoj de gravaj spiritualismaj verkoj ktp.

Lorenz estis poligloto kiu, laŭ atestantoj, scipovis 104 lingvojn inkluzive de pluraj indianaj, por kiuj li verkis gramatikojn. En la libro estas prezentita ne nur la vivo de Lorenz, sed grandan parton okupas ankaŭ priskribo de lia verkaro.